

=====

TERMINOTEKO
Informilo pri terminara laboro en Esperanto en
kunlaboro kun

Perkomputora Termino-Kolekto
(Terminoteko/Pekoteko)

aperas laŭbezone; represo kaj diskonigo de la
informoj estas dezirata

Redaktanto: Bernhard Pabst, Südweg 42, D-5202 Hennef-
Heisterschoß, Germanujo

Cirkulero n-ro 8 (3a jaro, 1/1993: aprilo 1993)
«93-05-25»

=====

Estimata sinjorino, estimata
sinjoro, karaj geamikoj,

iam estis «-ata/ -ita», iam
«kiom/ kiel», nune ondas la
«milito de l' majuskloj». Simile
dekomenca kiel la du aliaj, ĝi
nun refrapas al la fonto, la Fun-
damento mem. En nia lasta cir-
kulero ni jam recenzetis ties
dekan eldonon, prizorgitan de
la prezidanto de la Akademio,
d-ro Albault. En tiu ĉi numero
ni kiel anoncote reprenas la
temon por ekscii vian opinion;
jen tasko por vi, kiun serioze
plenumi postulas ne malmulte
da (re-) legado. Sed vidu nian
gvidan artikolon.

Pro spaco-manko nia rubriko
«terminikaj diskutoj» tiunumere
fariĝis mallongega. La unua-
vide malfavora fakto tamen
havas du tre ĝojigajn kaŭzojn:
La amaso da recenzindaj termi-
naroj kaj ... la apero de la "ofi-
ciala" libroforma eldono de
«Plena Pekoteko 1985-90»
(PP)!

Pri ties 1992-a prototipo ni
jam raportis (vd. ckl. 6, p. 1).
Jen fine do la kompleta verk-
ego. Kun ĝiaj 1816 paĝoj en tri
volumoj plus 68 paĝa detalega
demandilo prilingva ĝi estas la
plej ampleksa libro iam ajn el-
donita en Esperanto. Jen nur
unu el ĝiaj multaj rekordoj. Ĉar

=====
PP nun estas por ĉiu havebla ĉe la redaktanto sinjoro Eichholz, ni povas simple referenci al ĝi. Tio espereble "konsolos" vin pri nia magra enkajera "softvo"-diskuto.

Ĉar ĝi estos konstante reviziata, PP ne estas havebla pere de libroservoj. Tiel estas garantiata, ke vi ĉiam ricevas la plej aktualan version. Ankaŭ tio nekutima en la Esperanta libromerkato. "Jam temp' está" por malkovri la aliajn rekordojn de PP. Mendilon vi trovos sur la lasta paĝo.

Sincere

pb

enhavo

Saluton	1
la milito de majuskloj	2
terminikaj diskutoj: "Softvo"	3
novaj terminaroj	4
terminaraj projektoj	8
info-miks	15
Terminoteko kaj via fak-grupo	16
respondilo	16

la milito de majuskloj

Majuskloj ĉe etno-nomoj kaj ties derivaĵoj, ĉu jes aŭ ne? Jen la baza demando de nia ĉikajera lingva diskuto. Ĉu skribi do ekz. «Germanujo - Germano - Germana» aŭ anstataŭe «Germanujo - germano - germana». Tamen la problemo estas ankoraŭ pli komplika, kiel montras la ekzemploj de demandoj # 634 ĝis 671 en PP. Por citi nur unu: Ĉu vi skribus «Ĝeneva Lago», «Ĝeneva lago» aŭ «ĝeneva lago»?

Jen unu el la "klasikaj" disputoj de la Esperanta gramatiko. Multon oni jam argumentis pri ĝi, multaj argumentoj jam estas kolektitaj en PP. Tial kaj pro la limigita spaco de nia cirkulero ni - anstataŭ mem pledi - prezentas al vi liston de studoj pri la temo, kiujn ni klopodis iom krude ordigi laŭ la "tendaroj". Se la fontoj estas malfacile akireblaj, ni resumis la argumentojn. Certe ekzistas ankoraŭ pliaj kontribuoj. Anticipan dankon pro kompletigo de la listeto.

Por majuskligo en vortfamilioj, kiuj devenas el propraj nomoj argumentas:

1 Waringhien en PIV, p.

=====
XXXII.

2 PAG, 4a eld., § 39 (p. 68).

3 André Albault, Akademiaj Studoj (AkSt) 1985, p. 28-30.

4 Rüdiger Eichholz, AkSt 1983, p. 40-43.

5 Rüdiger Eichholz (ed.), Esperanta Bildvortaro (EB) p. 4.

6 Ludoviko Mimoo Espinalto, Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto - Komplementa Volumo - , 1a eld. 1989, Paderborno: Esperanto-Centro, p. 5.

7 Rikardo Ŝulco, Pledo por unueca lingvo, 1a eld. 1985, Paderborno: Esperanto-Centro, p. 180-181.

8 Rikardo Ŝulco, Sur la vojoj de la Analiza Skolo, 1a eld. 1987, Paderborno: Esperanto-Centro, p. 121-124.

9 Jacques-Franky Farjon de Lagatinerie, Post dudekkvar-jara gravedeco, [recenz-artikolo pri la Esperanta Bildvortaro], en: Esperanto aktuell, 7a jaro, kajero 4, julio-agusto 1988, p. 15-21 (20). p. 20: «[Plia punkto, kiu meritas esti konsiderata] estas la sistemigo de majuskloj en vortfamilioj, kiuj devenas el popolnomoj. Tiu sistemigo estas tre rekomendinda. Ĝi estas pli regula kaj pli konforma al la spirito de nia lingvo. Estas vere, ke, se Germanio nekontesteble estas propra

nomo, kiun oni devas skribi per majusklo, germano estas komuna nomo kaj germana nur adjektivo; sed en internacia lingvo, en kiu la skribita formo estas tre speciale grava por la interkompreniĝo, la majuskligo de la tuta familio tre faciligas la komprenon kaj simpligas la skribadon.»

Kontraŭ majuskligo en vortfamilioj, kiuj devenas el propraj nomoj argumentas:

1 Bjarte KALDHOL, Framveien 53, N-1420 Svartskog, Norvegio, en letero: «vi (t.e. d-ro Albault) enkondukas tiajn ... esceptojn en la morfologio ...»

Letera respondo de pb: «Vian rimarkon, .. mi ne komprenas. Laŭ mi estas escepto uzi anstataŭ la tute regulan serion "German'uj'o - German'o – German'a" la serion "German'uj'o - german'o - german'a", kie aparta regulo pri la ŝanĝo de majusklo al minusklo (aŭ inverse, se vi preferas) estas lernenda. Eble vi povas klarigi vian aserton en estonta letero.» Ne respondita.

2 G.F. Makking, Nia Fundamento sub lupeo, Antwerpen [B]: Flandra Esperanto-Ligo, 1990, p. 111-113: «Zamenhof ne donis majusklon al nomoj de popoloj, ĉar ili koncernas kate-

=====
gorion de multaj individuoj. Do malprave aperas majuskloj ĉe Turko (FE 20 vortlisto, kaj UV), Hispano kaj Germano (FE 34 vortlisto, Franco (FE 37 vortlisto).» Kaj plie: «Kiel skribi derivaĵojn de propraj nomoj? Nomoj derivitaj per sufikso [en la Fundamento] jen ne havas majusklon - kristano, (FE 37), esperantisto, esperantistaro A) - jen havas Parizano, Rusujano, Kalvinano (FE 37), Izraelido (FE 36), Nov-Jorkano, Varsoviano (UV). La lastaj ses malprave havas majusklon, ĉar pro la sufikso ili fari as individuoj de kategorio, kiuj ne rajtas pri majusklo.»

Tamen: «Alia afero estas pri derivaĵoj per finaĵo (-a aŭ -e). ... Bulonja kongreso ... Ekzemple sen majusklo bharata embarasas la leganton, sed Bharata tuj trankviligas kiel adjektivo de propra nomo de geografia loko. PAG [vd. supre] prave rekomendas uzi majusklon ĉe adjektivo por distingi inter propra nomo kaj kategoria nomo (Priama/pri-ama, Kuba/kuba, Senegala/ sen-egala, Kanaria/kanaria, Romana/ romana).

La magazino «Monato» kaj same ties interna informilo «Intermonato» sekvas la lingvo-uzon de la dua grupo («germano»). En Germanaj

Esperanto-publikigaĵo nuntempe ŝajnas ekzisti iu tendenco gardi la majusklojn, kiel montras la kajeroj de la «Speciala Cirkulero» (Esperanto-Centro Paderborno), «Esperanto aktuell» (Germana Esperanto-Asocio) kaj «GEJ-gazeto» (Germana Esperanto-Junularo). Kiel estas la situacio en aliaj landoj kaj lingvo-regionoj? Kion vi opinias? Bv. skribi al nia adreso aŭ respondu la cititajn demandojn en Plena Pekoteko.

terminikaj diskutoj

Softvo, softvaro, softo aŭ kio?

La en nia lasta cirkulero n-ro 7 uzita termino «softvo» provokis reagojn ("tro slangeca"). Ni pro tio ŝatus instigi vin al diskuto. La respektiva komplekso de PP estas 85/399. Komparu ĝin ankaŭ kun hardvo (85/398), frivo (89/112), ŝarvo (89/074), firmvo (89/087), komvo (89/165), grupvo (89/181), negocvo, ludvo, lernvo kaj hejmvo kaj similaj neologismoj kaj respondu la demandojn en la respondilo de PP aŭ trovu pli bonajn (malpli "slangecajn") tradukojn.

=====

novaj terminaroj

Floras la terminoj

Bernhard EICHKORN (eld.), Plant-Vortaro [PlantV], Plurlingva nomaro de sova aj plantoj en Eŭropo [PnspE], 5a eld. Villingen [D] 1992 [1a 1986, 4a 1990]

"Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj" (REF) [vd. nian noton en ekl. 6] afable sendis al ni printitan kaj diskedan version de sia mirinda verko <PnspE>, verkita laŭ la sistemo de Perkomputora Termino-Kolekto: 717 kolonoj aŭ ĉ. 240 paĝoj en formato A4 da plantaj terminoj en Esperanto kaj Scienca lingvaĵo (t.e. adaptita Latina) kaj tradukoj al Germana, Angla, Franca, Nederlanda kaj Sveda. Kelkaj nocioj krome entenas tradukojn al pliaj lingvoj kaj priskribon de la plantoj. Detala historio kaj celaro de REF, fontindikoj, klarigoj de la terminaraj principoj kaj -nelaste - diversaj indeksoj akompanas la verkon kaj faciligas la aliron al la informoj.

<PnspE> estas kontribuo al estonta Esperanta Plant-Vortaro. Jam nun ĝi integras la verkon de W.F. Pilger, Provizora privata listo de komunlingvaj nomoj de plantoj de

Nord-okcidenta Eŭropo 1982 [PPP], kaj la principaron de prof. Paul Neergaard pri "Plantnomoj en la Lingvo Internacia".

REF kunlaboras kun Pekoteko/Terminoteko kaj kun Terminologia Esperanto-Centro (TEC) de UEA.

Ĝia «ĉeflisto», t.e. ĝia baza datumaro, aspektas proksimume kiel reproduktita sube (la printita versio uzas alian printatoron kaj skribon ol tie ĉi).

La simbolo «µ», konservita tie ĉi, en la printita versio estis forigita. Ĝi helpas aŭtomate produkti indeksojn kun plurfoja mencio de kunmetaĵoj, ekz-e Germana «Weißtanne» fariĝas «tanne Weiß», tiel ke ĉiuj «Tannen», t.e. abioj, troviĝas kune en la Germana indekso kaj ne disspruĉitaj tra la tuta indekso laŭ la alfabeto intersekvo de la adjektivaj atributoj. Same forigitaj por printado estas la disigiloj «» kaj «/» indikantaj la elementojn de la Esperantaj terminoj. <PlantV> ankoraŭ uzas la malnovajn majuskulajn lingvo-simbolojn «{Eo}», «{De}», ktp. Laŭ la nova Terminoteko-normo ili estas unuece skribitaj per nur minuskloj, do «{eo}», «{de}» ktp. Tiu ŝanĝo estas facile elektronike farebla.

{U1} 582.475.2
 {Eo1} **Abi/o Blank/a** *ĉ*h
 {Eo2} **Abi/o Ar ent/a** EVIT
 * *i
 {De1} Weißtanne f *k*n
 {De2} Tanne f *j
 {De3} Edeltanne f *1*n
 {En1} silver fir *d
 {Fr1} Sapin m blanc *e
 {Fr2} sapin m pectiné * *m
 {Fr3} sapin m argenté *j
 {N11} Zilverspar *c
 {Sc1} Abies alba MILL.
 *ĉ*g*n
 {Sc2} Abies pectinata
 (LAM.) DC. AR *g
 {Sv1} silvergran *b

Fon: *b fri[be]; *c FWBN[be];
 *ĉ PPP[be]; *d FWFB[be]; *e
 FGFS[be]; *f FWPD[be]; *g
 SFF[be]; *ĝ vin[be]; *h PIV
 abio[be]; *i ei; *j Lar Fr-En[ei];
 *j be; *k DUD-gWb[be]; *l
 REG[be]; *m vin; *n REG[gh];

90 / r e f - 2001

Rim: be(91-08-02): {Eo2}
 estas traduko de {Sv1}. Unue
 mi pensis, ke fri proponas ĝin
 kiel popolecan nomon de Abies
 alba kaj mi metis *b post
 {Eo2}. Poste mi eksciis, ke fri
 estis petata de bos nur traduki la
 Svedajn nomojn Esperanten.
 Do li liveris nur tradukojn, ne
 proponojn de novaj popolecaj
 nomoj. Tial mi forigis lian *g
 post {Eo2} kaj anstataŭis en la
 suba respondo de ei la rimarkon
 "fri" per "subtenanto de

{Eo2} ". Sed por marki la limon
 de eblaj popolecaj nomoj, mi
 lasis mian unuan jenan ri-
 markon de 90-11-02 kaj la
 sekvan ei-respondon:

be(90-11-02): Mi forte mal-
 aprobas {Eo2}. Ĝi estas traduko
 de naci-lingvaj terminoj
 {Sv1},{En1} kaj {N11}. Sed
 {Eo1} estas traduko de {Sc1},
 kiu estas internacie fiksita
 termino de la Scienca nomen-
 klature. Krome {Eo1} estas en
 PIV. Plue ĝi estas facile me-
 morigebla. Pro tio ne necesas iu
 popoleca krom-nomo en Esper-
 anto. Ni ne kreu ĥaason per
 tradukoj el naciaj lingvoj, se
 jam ekzistas bona solvo en
 Esperanto.

ei: Mi tute konsentas. Por
 indiki tion klare mi metis EVIT
 post {Eo2} kaj post ĝi la re-
 ferencilojn de la kunlaborantoj,
 kiuj subtenas la evitindon de
 {Eo2}. Antaŭa subtenanto de
 {Eo2} devas decidi, ĉu ankaŭ li
 nun preferas la terminon {Eo1},
 ĉikaze li metu sian referencilon
 post EVIT, tiel la termino estos
 deklarita unuanime kiel evit-
 inda. Aŭ li rajtas persisti en sia
 prefero de {Eo2}, kaj li ne
 ŝanĝu ion. Se tiu okazus, ni
 petus aliajn kunlaborantojn, ke
 ili metu siajn referencilojn post
 {Eo1} aŭ {Eo2}, por konatigi
 siajn preferojn, por ke Peko-
 teko-uzontoj klare sciu, kiuj

terminoj ŝajnas esti preferindaj al kiuj personoj. Tiel ĉiuj tute malkaŝe povas kontribui ion por la unuecigo de nia lingvo. Ankaŭ se subtenante de {Eo2} eble iam poste ŝanĝus sian opinion, {Eo2} restos en Pekoteko, por ke neniu uzu ĝin, kiu povus opinii, ke {Eo2} estus bona traduko por ĉi tiu nocio. Ĝi ja estas klare markita per EVIT. Tiukaze sufiĉus, ke nur la referencilo de la kunlaboranto aŭ de la aŭtoro de la verko, en kiu la koncerna termino estis proponita, troviĝu post EVIT. <91-08-29>

{Eo1} **Abi/o Unu-kolor/a** *c
 {De1} Koloradotanne f *a
 {De2} Graŭtanne f *a
 {En1} -
 {Fr1} Sapin m concolore *b
 {N11} -
 {Sc1} Abies concolor
 (GORD. ET
 GLEND.)LINDL. EX
 HILDEBRAND *a

{Sv1} -
Fon: *a REG[gh]; *b vin; *c be;

9 1 / ref - 4 5 0 6

Rim: be(92-06-25): Laŭ SWP la scienca vorto "concolor" signifas "unu-kolora, sam-kolora". La pingloj de Abio Unukolora estas samkoloraj sur suba kaj supra flankoj. <92-04-22>

{Eo1} **Abi/o Grand/a** *b
 {De1} Große Tanne f *a
 {De2} Küstenotanne f *f
 {De3} Riesenotanne f *f
 {En1} Grand Fir *e
 {Fr1} Sapin m de Vancouver *c*ĉ
 {N11} Reuzen zilverspar *d
 {Sc1} Abies grandis
 (D.DON)LINDL. *a*f
 {Sc2} Abies excelsior
 FRANCO *f
 {Sv1} -

Fon: *a SFF[be]; *b be; *c bena,LAGV[be]; *ĉ vin[be];]; *d bos,HBB[gh]; *e oki, BW [be]; *f REG[gh];

9 0 / ref - 3 9 3 8

Rim: <90-03-24>

{Eo1} **Abi/o Dens-ping/a** *c
 {De1} Nordmannotanne f *a
 {En1} -
 {Fr1} Sapin m du Caucase *b
 {N11} Nordmann Zilverspar *ĉ
 {Sc1} Abies nordmanniana
 (STEVEN)SPACH *a
 {Sv1} -

Fon: *a REG[gh]; *b vin; *c be; BKH[bos];

9 1 / ref - 4 5 0 7

Rim: <92-04-22>

Pruvo pri la elasteco de la sistemo "Terminoteko" estas la diversaj plur-lingvaj indeksoj, duon-aŭtomate perkomputore

=====
kreitaj. Nuntempe ekzistas: Scienca-Esperanto (surbaze de la 5a eldono), Germana-Esperanta, Franca-Esperanta kaj Nederlanda-Esperanta (surbaze de la 4a eldono). Similan metodon jam realigis la Biblioteka Terminaro de Portmann kaj la Terminaro de Elektronikaj Muzikinstrumentoj de Spitaels, ambaŭ principe bazantaj sur la sistemo "Terminoteko". Jen do plia ekzemplo, kiel tiu sistemo povas faciligi la terminarajn laborojn sur plej diversaj fakaj kampoj.

Kaj estontece? REF daŭre serĉas komputorantojn por klavi pliajn lingvojn, precipe Nederlandan, Italan, Hispanan, Latinan kaj Norvegan. Same manuskriptoj en la Pola, Ĉeĥa, Slovaka kaj Rusa kuŝas ĉe sinjoro Eichkorn kaj atendas spertajn gepatra-lingvaj klavantojn. Kontakti lin do je Romäusring 20, D-W-7730 Villingen, Germanujo.

Arizona vortaro

Edveno GROBE (komp.), Eta Arizona Vortaro Vol. 1, 100 specialaj arizonaj vortoj kun difinoj kaj ekzemplaj frazoj, Tempeo [Arizono, Usono]: Arizona Stelo

La "Arizona vortaro" estas kvazaŭ postrikolto de la bedaŭrinde ne plu aperanta revuo "Arizona Suno" (1991-1992) per kiu sinjoro Grobe raportis i.a. pri tipaj kulturaj, etnaj, ekonomiaj kaj socialaj apartaĵoj kaj okazintaĵoj de tiu sudokcident-Usona ŝtato. Sur la maldekstraj paĝoj troviĝas Esperantaj terminoj kaj difinoj, sur la dekstraj la respektivaj Anglaj proksimume laŭ jena tipo (la originalo uzas alian skribon kaj formaton):

1. **AGAVBRANDO.** Forta agavdevena alkoholaĵo distilita ĉefe en meksikia urbo Tekilo. "Agavbrando estas la ĉefa ingredienco de la agavkoktelo kiun arizonanoj ofte mendas kiam ili manĝas ĉe meksikiaj restoracioj."

1. **TEQUILA.** A strong agave-derived alcohol distilled mainly in the Mexican city of Tequila. "Tequila is the chief ingredient of the margarita Arizonans often order when they dine in a Mexican restaurant."

11. **DISKOPANO.** Kresposimila maiz- aŭ tritikfarundevena panajo rondigita kaj platingita is diskoformo per laŭta kaj ritma intermanplata frapetado fare de meksikiaj virinoj kaj kiun oni rajtas manĝi kiel

apartan panon sed kiu plej ofte funkcias kiel bazo de kunmetita meksikia manĝaĵo. "La tritika diskopano estas pli granda ol la maiza, havante preskaŭ la dimensiojn de vespermanĝa telero."

11. **TORTILLA:** A crepe-like bread ktp.

13. **DORMETPAŬZO.** Post-tagmeza dormperiodo ktp.

13. **SIESTA.** An afternoon rest-period ktp.

Laŭ la postparolo celo de la terminaro estas «doni al arizojnaj esperantistoj pli grandan kaj pli tujan kapablon paroli esperante pri tiaj [t.e. Arizojnaj] temoj», t.e. ĝi volas esti helpilo por Esperantigo de nocioj gravaj precipe en certa regiono. La terminaro pro tio bone ilustras la konatan kaj ĉiaman demandon, kiuj nocioj eniru la ĝeneralan vortstokon de Esperanto kaj en kiu formo, ĉu per propra termino, ĉu per priskiba kunmetaĵo el ĝeneralaj vortoj. Temas do pri parto de la ofte nediferencite t.n. "neologisma diskuto".

Dum sinjoro Grobe en la kajeroj de "Arizona Suno" tendencis enkonduki la lokajn terminojn en Esperanta vesto («tekilo», «tortijo», «siesto»), li nun sekvas la "purisman" vojon

bazante sin nur sur vortoj «troviĝantaj en PIV kaj aliaj respektataj esperantaj vortaroj».

Al mi lia pli frua (spontanea?) solvo pli bone plaĉis, almenaŭ ĉe la supre cititaj tri nocioj, laŭ mi jam sufiĉe konataj internacie. Verdire mi ne komprenis, kiujn aĵojn la aŭtoro celis sen rigardi al la Angla kolumno. Ekz-e mi ja konas *Tequila*, sed eĉ ne sciis, ke oni produktas ĝin el agavoj kaj pro tio ne komprenis la terminon «agavbrando». La trinkaĵo estas almenaŭ en Germanaj trinkejoj simile konata kiel viskio aŭ vodko kaj pro tio laŭ mi ankaŭ en Esperanto rajtas je propra "neologismo" laŭ la 15a regulo (alia demando estas, ĉu oni preferas transskribon kiel «tekilao» aŭ simile por eviti la misan analizon «tek/ilo»). Simile laŭ mi «tortijo» havas la saman rajton kiel ekz-e «pico» (PIVS), «siesto» kiel «saŭno» (kaj ne «ŝvit-domo»). Kontraŭe ĉe aliaj nocioj internacie malpli konataj mi same opinias kiel sinjoro Grobe, ekz-e ĉe «konusdomo» anstataŭ «hogano» (konusforma loĝejo de Navahoj indiano).

Eĉ se mi pri multaj detaloj do havas aliajn preferojn, mi taksas la "Arizonan vortaron" interesa: Ĝi abunde liveras materialon pri la menciita

demando "kiujn nociojn Esperantigi kaj kiel?" Ĝi atentigas la Esperantan komunumon pri manko de speciala speco de "fakaj" terminaroj, nome pri terminaroj de regionaj esprimoj; ĉiuj naciaj aŭ regionaj Esperanto-organizaĵoj estas do daŭre invitataj kontribui nociojn el siaj kultur-sferoj. Ĝi - nelaste - ebligas agrablan promon tra unika kulturo de sudokcidenta Usono.

La terminaro supozeble estas produktita per Makintoŝ-komputoro. Kontakti oni povas sinjoron Edwin Grobe, 1620 North Sunset Drive, Tempe, AZ 85281, Usono.

Parolanta vortaro por AMIGA

Ulrich Habel, Vorttradukaj programoj Esperanto-Germana kaj Esperanto-Angla por AMIGA-komputoroj

Reinhard Pflüger, Lernprogramo por AMIGA-komputoroj surbaze de la kurso "Esperanto - Schritt für Schritt" en versioj kun Germana aŭ Angla kiel instrulingvoj;

3,5-cola disketo kun ĉiuj programoj de ambaŭ aŭtoroj, presita priskribo de la kurso en Germana kaj Angla, aliaj

materialoj kaj dua disketo kun pliaj publik-posedaj programoj kostas 10 gmk pagenda al Reinhard Pflüger, Jakob-Trumpfheller-Str. 6, D-6800 Mannheim 1, Germanujo per monbileto aŭ al UEA-konto rpfl-n.

La vortaro Esperanto-Germana enhavas 2585 vortparojn, la vortaro Esperanto-Angla 2995. Ili funkcias ambaŭdirekte laŭ jena modelo:

> [serĉu] des*

esperanta vorto

germana vorto

esperant. Wort deutsches Wort

des

desto

desegni

zeichnen

deserto

Nachspeise

destino

Bestimmung

tial

deshalb

ties

dessen

...

ĉi

(zur Bezeichnung des Näheren)

ju ... des

je ... desto

> [serĉu] meriti

meriti

es wert sein

meriti

verdienen (Belohnung)

> [serĉu] Seite

flanko Seite

paĝo Seite (eines Buches)

La programo Esperanto-Angla funkcias same, sed precizigoj estas raraj kaj plurvortaj esprimoj estas skribitaj laŭ speciala stilo, ekz-e:

> [serĉu] neniel
esperanta vorto angla vorto
Esperanto word English word
neniel inNoWay

Ili estas legeblaj nur per AMIGA-komputoroj, tamen bedaŭrinde ne per IBM-maŝinoj.

La lernprogramo en Assembler estas nova versio 2.0 nun trioble pli ampleksa ol la antaŭa, kiu eĉ scipovas paroli la lernendajn frazojn - kun iom da Usona akcento sed tolereble. Ĉio ĉi estas ege favorpreza, ĉar temas pri «publika posedaĵo» aŭ «frivo»:

{U1} 681.3.065
{T1} KEG
{eo1} **friv**/o** *a
{eo2} **liber-var/o** *c
{eo3} **publik/a posed/aĵ/o** *c
{en1} freeware *b
{en2} public domain
 software *b

Softvo (85/399), kiun oni rajtas senpage uzi. (89/074, 89/087) *a laŭ *b.

Fon: *a ei; *b ComGlo; *c rpfl;

8 9 / 1 1 2

Rim: «89-12-04»

(laŭ informo de rpfl)

terminaraj projektoj

1. Kristana Terminaro

Sinjoro Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-7730 VS-Villingen ne nur motoras por la Esperanta Plantvortaro [vd. la recenzon en tiu ĉi ekl.], li ankaŭ iniciis novan Kristanan Terminaron [KristT], kiu unuigu i.a. la ĝisnunan W. Flammer, Katolika Terminaro, kaj aliajn fontojn en unu granda elektronika datumbazo, ĝisdatigata kaj provizata per novaj terminoj intertempe aperintaj, kiu estos bazo de aktualaj "paperaj" eldonoj. Pro la laboroj pri <PlantV>, tiuj pri <KristT> iom stagnis kaj ĝis nun nur atingis komencan nombron da terminoj, haveblaj en la elektronika Terminoteko-serio 89/be-000 ĝis 90/be-299. Tamen sinjoro Eichkorn esperas "reataki" <KristT> en somero 1993. Via helpo jam nun estas ege bonvena.

2. IFEF: FT, NV, DV, AV

Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEF) jam de multa tempo tre konstante laboras sur terminara kampo. Pro grava malsaniĝo de gvida aktivulo, sinjoro Hartig,

la plua laboro estis en danĝero. Nun ni ricevis la "komunikilo[n] de la terminara komisiono [de] IFEF", "TK-kuriero", n-ro 85 (!) de oktobro 1992. En ĝi sinjoro Hartig i.a. skribas: «mi estas denove sur la scenejo, etpaŝe kaj sub protesto de la kuracisto». Li - kaj kun li same ni - esperas, ke li ankaŭ estonte povos redakti la grup-internan informilon "TK-kuriero". Ni elkore deziras al sinjoron Hartig plenan resaniĝon kaj forton por daŭra sukcesa terminara laboro.

La gvidon de la terminara komisiono transprenis doktoro József Halász. Prioritata celo de IFEF nuntempe estas pretigo de diversaj "Nacilingvaj Fervojoj Vortaroj" (NV) fare de ĝiaj landaj sekcioj. Komune, t.e. internacie, oni laboras super "Difina Vortaro" (DV), difinante malfacilajn terminojn el la "Fervoja Terminaro" (FT) aperinta en 1989 kaj havebla en libroservoj. Per "Aktuala Fervoja Vortaro" (AV) fine oni intencas informi la fervojistan mondon pri la plej novaj, ekz. teknikaj evoluoj kaj havigi la necesajn terminojn.

Impreson pri la faka amplekso donas jena eltiro el la listo de subfakoj ordigitaj laŭ kodnumeroj:

- 00 Ĝeneralaĵoj
- 01 Tekniko Ĝenerale

- 10 Komercaj demandoj
 - 11 Komercaj demandoj pri pasaĝertrafiko
 - 12 Komercaj demandoj pri vartrafiko
 - 20 Trajntrafiko, ekspluatado
 - 21 Pasa ertrafiko
 - 22 Vartrafiko
 - 23 Preskriboj, sekureco
 - 30 Trakveturiloj
 - 31 Trakciiloj
 - 32 Vaportrakciiloj
 - 33 Dizelaj trakciiloj
 - ktp.*
 - 50 Juraj demandoj
 - 60 Administrado, organizado, personalo
 - 70 Financoj, konto, direktado, afergvidado
 - 90 Aŭtomata kuplilo
- Kiel oni vidas ekzistas multaj kontakt-punktoj al najbaraj fakoj (ĝenerala tekniko, juro, ekonomio ktp.), tiel ke interŝanĝo de spertoj ŝajnas al ni dezirinda. Kontaktojn peras Bernhard Pabst, Südweg 42, D-W-5202 Hennes, Germanujo.

3. Universitataj stud-materialoj

D-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, Germanujo, dankinde sendis al ni jenajn tri broŝurojn eldonitajn de li: Konjunkturpolitiko (1989, 58 p), Entrepreno (1991,

64 p.) kaj Trafiko (1992, 72 p.). Temas pri studmaterialoj por kursoj enkadre de la Sanmarinaj Universitataj Semajnoj.

La "studhelpiloj" estas interesaj ankaŭ el terminara vidpunkto, ĉar ili devigis la aŭtoron trakti liajn temojn en Esperanto kaj do trovi taŭgajn terminojn. Lian gvidlinion pri tio li skizas en sia antaŭrimarko al "konjunkturpolitiko": «Verki nove pri fako, tio ne estas afero de neologismoj. Nur necesas fiksi ĉe ekzistantaj vortoj ilian fakan signifon. Tiam ĉiu fakulo ĉie ajn same komprenas pri kio temas. Por tiu tutmonda sameco zorgas bonaj vortaroj kun difinoj». Kaj fakte en "konjunkturpolitiko" li preskaŭ ekskluzive bazas sin (kaj ofte referencas) je PIV kaj IKEV. Des pli dezirinde estus, se tiaj universitataj materialoj en Esperanto regule kaj memkompreneble enhavus glosarojn kun ĉiuj nocioj ne jam facile troveblaj en la nuntempaj "bonaj vortaroj". El la multaj interesaj terminoj de "trafiko" <Traf> mi jen notas nur kelkajn trovitajn sur la unuaj pa o j:

{eo1} **magnet-ŝveb/a**
trajn/o *a
{de1} Magnetschwebebahn f
*b
Moderna amas-trafikilo ligita

al relo; kontraŭe al klasika trajno ÷o tamen ne rulas sur relo, sed dum la voja o senkontakte ŝvebas iom super ĝi levita per forpuŝa magneta forto. Tiel ebligante pli grandajn rapidojn ol ĉe trajno ÷o ŝtopu la bezonon por transportilo sur "mezaj" distancoj kie trajno estas tro malrapida, dum aviadilo estas tro kosta: *La unua linio de ÷o ligu la metropolojn Berlino k Hamburgo situanta je distanco de ĉ. 350 km.* *b

Fon: *a Traf,p8; *b pb;

9 3 / p b - 0 0 0

Rim: <92-11-14>

{eo1} **atend/o-cirkl/o** *a

{de1} Warteschleife f *b

Rondflugo de aviadilo super flughaveno ŝtopita pro troa trafiko, atendante la permeson surteriĝi: *La Germana aertransporta kompanio Lufthansa elspezis en 1991 nur pro malfruiĝoj kaj flugoj en ÷oj 150 milionojn da germanaj markoj.* *b laŭ *a

Fon: *a Traf,p10; * pb;

9 3 / p b - 0 0 1

Rim: <92-11-14>

{eo1} **pendol-vetur/i** ntr *a

{de1} pendeln ntr *b

Vojaĝi ĉiun labor-tagon matene de la hejmo al la laborejo kaj vespere reen: *En Hamburgo proksimume 243 mil laboristoj*

=====
*el najbaraj distriktoj ÷as
ĉiutage en la metropolo.* *b laŭ
*a

Fon: *a Traf,p12; *b pb;
9 3 / p b - 0 0 2

Rim: «92-11-14»

{eo1} **pint-hor/o** *a
{de1} Rushhour f *b
{en1} rush hour *b

Horo de plej densa trafiko,
kiam la → pendol-veturantoj
matene iras en la urbocentron
aŭ vespere forlasas ĝin denove.
*b

Fon: *a Traf,p12; *b pb;
9 3 / p b - 0 0 3

Rim: «92-11-14»

{eo1} **ŝtop/iĝ/o** *a
{eo2} **trafik/a top/i/o** *b
{de1} Stau m *b
{de2} Verkehrsstau m *b
{en1} traffic jam *b
{es1} embotgliamiento m *b
??
{fr1} embottelage *b ??

Troa trafika denso sur strato
aŭ aŭto-ŝoseo kaŭzanta longan
vicon de starantaj aŭ nur mal-
rapide antaŭirantaj veturiloj:
*÷oj de longo de 80 km en la
90aj jaroj ne plu estas raraj sur
Germanaj aŭto-ŝoseoj dum
ferikomenco.* *b laŭ *a → radia
÷-informo

Fon: *a Traf,p15; *b pb;
9 3 / p b - 0 0 4

Rim: «92-11-14»

{eo1} **kombin/it/a trafik/o**
*a

{de1} kombinierter Verkehr
m *b

Trafiko, en kiu plataj fervojaj
ŝarĝ-vagonoj portas kamionojn,
tiel "kombinanta" la trafikajn
sistemojn de strato kaj relo:
*K÷o malŝarĝu stratojn k aŭto-
ŝoseojn de kamionoj k tiel helpu
eviti → ŝtopiĝojn.* *b laŭ *a

Fon: *a Traf,p15; *b pb;
9 3 / p b - 0 0 5

Rim: «92-11-14»

{eo1} **ĉirkaŭ'voj/o** *a

{de1} Umgehungsstraße f *b
Strato ĉirkaŭanta urbon,
vilaĝon aŭ loĝkvartalon kiu
malŝarĝu la enurban trafikon de
la longdistanca kaj tiel pli-
bonigu la loĝkondiĉojn (pli
bona aero, malpli da bruoj):
*Suferinte dum jaroj pro la ka-
miona trafiko sur la mallarĝaj
stratetoj en la malnova urbo-
centro, la loĝantoj postulis
konstruon de ÷o.* *b

Fon: *a Traf,p16; *b pb;
9 3 / p b - 0 0 6

Rim: «92-11-14»

{eo1} **P + R** *a
{eo2} **privat-aŭt/oj en
rapid-trajn/ojn** *a
EVIT *b

{de1} P + R *b

{de2} Parken und Reisen n

=====

*b
{de3} Park and Ride *b
{en1} park and ride *b
Trafikpolitika koncepto laŭ
kiu → pendol-veturantoj el naj-
baraj distriktoj de metropolo
per privataj aŭtoj veturu nur ĝis
la urborando, lasu la aŭtojn sur
tieaj parkejoj kaj iru al la urbo-
centro per publikaj trafikiloj
(metroo, tramo): ~ malŝarĝu la
urbocentrojn de troa aŭto-
trafiko. ~-parkejo, ~-stacio *b
Fon: *a Traf,p22; *b pb;

9 3 / p b - 0 0 7

Rim: pb: {eo2} pensigas pri
tio, ke oni transportigu la
aŭtojn, ne la pendol-veturantojn
per rapid-trajnoj. Tio tamen
estas alia koncepto simila al tiu
de «kombinita trafiko», nome
ke oni per trajno transportas
privatajn aŭtojn ekz-e al feriejo
(de: «Autoreisezug»). Por la
nocio celata tie ĉi {eo2} laŭ mi
pro tio estas evitenda. «92-11-
14»

{eo1} **trafik-komun/aĵ/o** *a
{de1} Verkehrsverbund m *b

Kontrakta kunligo de unuopaj
entreprenoj de enurba aŭ regi-
ona trafiko, tiel ke ekzistas unu-
ecaj tarifoj k necesas nur unu-
foje pagi ununuran bileton: *En
la ÷o de Kolonjo oni rajtas uzi
per la sama bileto ĉiujn busojn,
metroojn, tramojn kaj certajn
trajnojn de la nacia fervojo*

*circulantajn inter la urboj
Kolonjo k Bonn.*

Fon: *a Traf,p25; *b pb;

9 3 / p b - 0 0 8

Rim: «92-11-14»

Tiajn glosojn kaj tradukojn
tamen prefere faru la fakulo
mem: Li plej bone scias, kion li
volas esprimi. Liaj difinoj eble
estas fake pli ĝustaj kaj koncizaj.
Lia peno verki fake en
Esperanto samtempe servus
plurajn bezonojn, la konkretan
kurson kaj - daŭre - la ĝener-
alan vortstokon de Esperanto
kaj pro tio ties evoluon. Male
sen tiaj glosaroj lia tuta laboro
preskaŭ certe ne postvivus la
konkretan okazon. Ĉar kiu
Esperantisto, kiu serĉas ekz-e la
Esperantan ekvivalenton de
«Verkehrsverbund», ne trov-
ebla en iu vortaro Germana-
Esperanto, memoros, ke ĝi
troviĝas en la verko <Traf>.
Kaj eĉ se iu memorus tion, kiu
havus la tempon relegi la tutan
verkon por trovi nur unu bezon-
atan vorton? Anstataŭe li certe
reinventus iun terminon, en
multaj kazoj kun alia rezulto,
refarus do laboron jam faritan
kaj samtempe kontribuis al
malunueca lingvo-uzo. Do
nepre necesas ĉe niaj fakuloj la
kompreno pri tio, ke "kio ne
estas en [facile konsultebla]
vortaro, ne estas en mondo". La

=====
rolon de tia vortaro, kvazaŭ de la "terminara memoro de Esperanto" nuntempe ludas Terminoteko.

«Por tiu tutmonda sameco zorgas bonaj vortaroj kun difinoj», zorgu do per glosoj la fakuloj pri ĉiam pli «bonaj vortaroj».

4. Britaj birdoj

Sinjoro Ian Jackson, 29 Graham Road, Chiswick, London, Britujo, W4 5DR ne nur aktivas pri Angla-jura terminaro (nia kkl. 6). Nun li afable sendis «liston de britaj birdoj laŭ esperantaj ĉefvortoj» sur 8 p. A4, versio de 92-10-27 produktita per WordPerfect 5.1 (IBM/DOS). Laŭ akompana letero la listo sekvas la rekomendojn de Ornitologia Rondo Esperantista (ORE), tamen anstataŭiganta «mallong» per «kurt» kaj «mallarĝ» per «stret» en kunmetitaj vortoj «por eviti pezecon». Proksimume ĝi aspektas jene (la originalo uzas alian skribon kaj formaton):

CIRKUO	harrier
blua cirkuo	hen harrier
griza cirkuo	Montagu's harrier
marĉocirkuo	marsh harrier

IFAFO	chiffchaff
EMBERIZO	bunting
flava emberizo	yellowhammer
grenemberizo	corn bunting
ktp.	
neĝemberizo	snow bunting

Kursiva skribo indikas «ĝeneralan nomon, komunan al pluraj specioj», majuskligo enskribo-titolon («ĉefvorto»). Jam plurfoje ni atentigis, ke tiu lasta grafika rimedo laŭ ni estas ne-taŭga en Esperanto, ĉar ĝi malebligas sekuran informon pri vort-komenca majusklo aŭ minusklo. Pri tiu detalo niaj vortaristoj prefere sekvu la modelon de PIV. Grasigo kaj linia elstarigo kutime sufiĉas por gvidi la okulojn.

En la nuna versio mankas ankoraŭ la sciencaj nomoj, kiel registritaj en PIV («neĝemberizo. Specio ktp. (Plectrophenax nivalis)») aŭ (granda-parto) en la vortaro Esperanto-Angla de Butler de 1967 <BU>: «**ĉifĉaf-o**, (orn) chiffchaff (Phylloscopus collybita). Cp filoskop.» Same mankas internaj referencoj, temas ja (ankoraŭ) pri "nura" vortlisto.

Parte la listo enhavas "novajn" birdo-nomojn ne jam troveblajn en <BU>, parte mankas birdoj tie registritaj, kiel montras la ekzemplo de "emberizoj":

=====

Butler Jackson

flava emberizo flava
emberizo

flavbrusta emberizo --
grena emberizo grenemberizo
-- heĝemberizo
kana emberizo kanemberizo
malgranda emberizo --
neĝa emberizo ne emberizo
rustika emberizo --

Volonte ni aŭdus opinion de
birdo-eksperto pri kompleteco
kaj eble necesa elekto de la
terminoj. Interesatoj petu la
liston, tre bonvenan kontribuon
al la ornitologia terminaro de
Esperanto, rekte de l' aŭtoro kaj
skribu al ni.

5. Perkomputora Termino-
Kolekto 1991

Post la serioj de 1985-1990
atendas printadon nun la serioj
de 1991-92. Jen eta eltiraĵo pri
Meksika kuirarto, por gustumi
kaj frandi:

{eo1} **tortij**/o** *a
{es1} tortilla (Mex) *a
Plata, maldika, ronda,
kresposimila pano, fabrikata aŭ
el maiz- aŭ el tritikfaruno (→
maiz÷o, farun÷o), k kiu estas
bazo de multaj manĝaĵoj de la
Meksikia kuirado. *b laŭ *a
Fon: *a ArizSun91/3,p2; *b pb.

9 1 / p b - 2 7 4

Rim: «91-12-26»

{eo1} **maiz-tortij**/o** *a
El maizfaruno fabri-
kata tortiĵo (91/pb-274), kiu
funkcias kiel bazo de kvar
ŝatataj Meksikiaj manĝaĵoj,
nome de → tako, → tostado, →
enĉilado k → flaŭto. *b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p2; *b pb

9 1 / p b - 2 7 5

Rim: «91-12-26»

{eo1} **tak**/o** *a
{es1} taco *a
Unufoje faldita maiz-
tortiĵo (91/pb-275), fritita en
varmega graso ĝis kiam ĝi
fariĝas firma k krusta. En la
poŝon, kreitan de la faldo, oni
enmetas miksaĵon de hakita
bovaĵo, antaŭkuirita en spica
tomato-sauco. Sur la viando-
miksaĵon oni ŝprucigas mal-
dikajn tavolojn de hakitaj
laktuko, tomato k raspita
fromaĝo. Oni manĝas la ÷on
rekte el la manoj kiel sandviĉo.
*b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p2; *b pb.

9 1 / p b - 2 7 6

Rim: «91-12-26»

{eo1} **tostad**/o** *a
{es1} tostada *a
Fritita k sekigita sed
ne faldita maiztortiĵo (91/pb-
275), kun tavolo de ruĝaj

=====

Meksikiaj faboj frititaj, sur kiu oni ŝprucigas aliajn tavolojn de hakitaj laktukoj, tomatoj, cepoj k raspita fromaĝo. T÷o, kiel tako, estas manĝata elmane, sandviĉostile. *b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p3; *b pb

9 1 / p b - 2 7 7

Rim: «91-12-26»

{eo1} **enĉilad**/o** *a

{es1} enchilada *a

Maiztortijo (91/pb-275), mallonge (2-3 sekundojn) fritita, en kiun oni metas fromaĝon aŭ viandan farĉaĵon, k kiun oni poste kunrulas. Oni apudvicigas plurajn ÷ojn en longa maldika kaserolo k verŝas antaŭkuiritan fromaĝon aŭ tomatan saŭcon sur ilin. E÷ojn oni servas sur telero k man as per forko. *b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p3; *b pb.

9 1 / p b - 2 7 8

Rim: «91-12-26»

{eo1} **flaŭt**/o** *a

{es1} flauta *a

Maiztortijo (91/pb-275) simila al → enĉilado (91/pb-278), sed fritita en varmega, profunda graso ĝis krustega punkto, por ke oni povu ĝin manĝi elmane kiel sandviĉo. *b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p3; *b pb

9 1 / p b - 2 8 0

Rim: «91-12-26»

{eo1} **kesadij**/o** *a

{eo2} **froma -krust/aĵ/o** *a

{en1} cheese crisp *a

{es1} quesadilla *a

Granda faruntortijo kun dika tavolo de raspita fromaĝo, kiun oni distranĉas en triangulaj porcioj. *b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p3; *b pb.

9 1 / p b - 2 8 1

Rim: «91-12-26»

{eo1} **burit**/o** *a

{es1} burrito *a

Faruntortijo bakita en varma forno k plurfoje faldita kun farĉaĵo laŭ la gusto de la kliento, ekz-e el ruĝaj faboj aŭ diversaj viandomiksaĵoj antaŭkiritaj kun spica kapsiksaŭco. *b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p3; *b pb

9 1 / p b - 2 8 2

Rim: «91-12-26»

{eo1} **ĉimiĉang**/o** *a

{es1} chimichanga *a

Faruntortijo fritita en varmega graso k plurfoje faldita kun farĉaĵo laŭ la gusto de la kliento, ĝenerale konsistanta el spicigitaj viandomiksaĵoj. ÷on oni servas kun → gvakamolo (91/pb-284). *b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p4; *b pb

9 1 / p b - 2 8 3

Rim: «91-12-26»

=====

{eol} **gvakamol**/o** *a
{esl} guacamole *a
Jogurt-simila, kazeiĝ-
inta kremo kaj avokado-saŭco,
kiun oni servas al → ĉimiĉango
(91/pb-283). *b laŭ *a

Fon: *a ArizSun91/3,p4; *b pb.

9 1 / p b - 2 8 4

Rim: «91-12-26»

Indice español

91/282 burrito
91/283 chimichanga
91/278 enchilada
91/289 flauta
91/284 guacamole
91/281 quesadilla
91/276 taco
91/274 tortilla
91/277 tostada

6. Psikologia terminaro

Sinjoro Helmut Welger,
Bismarckstr. 28, D-W-3550
Marburg, Germanujo
interesiĝas pri kreo de psiko-
logia terminaro kaj serĉas kun-
agantojn.

Pri psikologia terminaro laŭ
nia scio ne jam ekzistas multaj
prepar-laboroj. Enciklopedio de
Esperanto <EdE> p. 290 je
«Pedagogio kaj Psikologio»
mencias nur:

1925 Trarbach, P.. Teknika
Vortareto de Pedagogio, Logiko
kaj Psikologio, eo, de, fr, en.

1934 Bennemann, Paul.
Terminaro Pedagogio kaj Psi-
kologia, eo, de, en, fr.

1966 Nagy, I.. Lerneja
Esprimaro Esperanta, eo, hu.

Ĉu iu leganto povas sendi
kopion de la Bennemann-termi-
naro al la redakcio de Termi-
noteko?

7. Ŝaka terminaro

La terminaro de Esperanta
Ŝak-Ligo Internacia (ELI, vd.
ckl. 6) bone progresas. Anoncis
sin du pliaj interesatoj, kiuj
espereble multe kontribuos al la
malneto. Krome pretiĝis mal-
granda historia skizo pri
«Esperanto kaj ŝako», kiu
eniros la finan version. Pliaj
interesataj ŝak-ludantoj povas
same peti ĝin de la Termi-
noteko-redakcio laŭdezire sur
diskedo aŭ en printita formo.

info-miks

1. TEC: Nova softvo- rekomendo

Terminologia Centro de UEA
(TEC) de post la ŝanĝo en la
oficejo (vd. nian ckl. 6) re-

=====
komendas nun alian softvon uz-
endan por Esperanta terminara
laboro. Dum ĝia "Zagreba tem-
po" estis proponita la datum-
baza programo CDS-ISIS,
senkoste havebla de Unesko en
Parizo, kondiĉe ke oni ne uzas
ĝin profito-cele. Ŝajne TEC tiu-
tempe jam (parte) evoluis uz-
skemon kaj tradukis la Angla-
lingvan manlibron al Esperanto.
La Klodna oficejo nun tamen
konsilas aĉeti komercan softvon
Paradox, por uzi ties ofertatajn
elektronikajn vortarojn. Ĉu ili
estas uzeblaj ankaŭ por tiuj,
kiuj tiutempe akiris CDS-ISIS,
bedaŭrinde ne estas indikita.
CDS-ISIS en 1991 estis sen-
koste havebla de UNESCO,
Service IPS/SDA Bureau G068,
7, Place Fontenoy, F-75700
Paris, Francjo.

2. Resolucio pri TEC

La "komitato" de UEA "rezo-
lucii" pri TEC en la Viena UK,
postulante i.a. pli detalajn
informojn pri ties agado inter
1987 kaj 1992 kaj la konsisto
de la TEC-estraro por ke ĝi
povu "aprobi" ĝin laŭ la "TEC-
regularo". La plenan tekston de
la "rezolucio" oni devus povi
akiri de la Komitato de UEA,
Nw. Binnenweg 176, NL-3015
BJ Rotterdam, Nederlando.

3. ProtexT/Prowort

Rutino por aŭtomata revi-
zado de Esperantaj tekstoj,
nome tekstokorektan radikaron,
uzeblan kun la softvo
PROTEXT (Germana versio
PROWORT) evoluigis sinjoro
Bertilo Wennergren, Sanna-
dalsv. 4, 2 tr., S-117 65 Stock-
holm, Svedujo. PROTEXT
ekzistas por kaj Atari- kaj IBM-
kongruaj komputoroj. Jen utila
help-programo, kiu faciligas
elsarki klav-erarojn.

kion Terminoteko povas fari
por via fak-grupo?

Vi aktivis en unu el la ĉ. 50
fakaj Esperanto organizaĵoj kaj
ĉiam revis pri terminaro de via
fako, ĉu jura, ŝaka, bahaa,
matematika, filozofia aŭ iu ajn
alia. Vi eble jam disponas pri
manuskripto, longe netuŝita, de
malnova aktivulo. Bela revo,
sed kiel realigi ĝin?

Ni disponas pri ĝeneralaj
terminaraj spertoj kaj pri spertoj
de elektronika, perkompatora
terminara laboro de pli ol sep
jaroj. En la rapide ŝanĝanta
mondo de komputoroj tio
signifas kvazaŭ "duonan
eternecon".

Vi ne volas "reinventi la
radon". Do, kial ne konsiligu

=====
nin?

Ni helpas al vi pri ĉiuj teknikaj aspektoj de la laboro: Kiun komputoron aĉeti, kiun programaron uzi, kiun aranĝon elekti, kiel solvi la problemon de multlingvaj tekstoj kun multaj specialaj literoj kaj simboloj.

Vi restas tute sendependa pri la enhavo de via terminaro, ĉar estas vi, kiu estas fakulo pri via specialaĵo.

Ni garantias al vi aliron al sistemo, kiu estas malferma al la nuna monda merkato de elektronikaj vortaroj kaj al tiu de la estonteco. Tio signifas, via nuna faka laboro neniam plu foriras en unudirekta strato, sed kontraŭe estos facile plu-evoluigebla de viaj fakaj posteuloj kaj uzebla de multe pli granda rondo ol via nura fakgrupo.

Ni konektas vin kun multaj aliaj fakoj; jam pli ol 14.000 terminoj estas je via dispono.

Jen facila maniero por vi kontribui al la evoluo kaj bono de Esperanto.

Do, kial ne konsiligu nin?

Viajn demandojn kaj proponojn vi sciigu per la respondilo.

materialoj haveblaj de terminoteko

Mi petas jenajn cirkulerojn de Terminoteko (unuopaj ekzempleroj senkostaj:)

___ 1. Fariĝu lingvo-observanto (ckl. stato 92-05-22)

___ 2. Usonaj subnutraĵoj (ckl 92-07-05)

___ 3. Provregistriĝo de elektroteknika vortaro (ckl. stato 92-07-05)

___ 4. Printi Terminoteko-registraĵojn sen Letrikso - rekomendoj por komputorantoj (ckl. stato 92-06-16)

___ 5. Propraj nomoj el Sudafriko (ckl. stato 92-06-22)

___ 6. Esperanta terminara laboro en 1992 (ckl. stato 92-10-03)

___ 7. Ĉu terminika revuo, kaj kia? (ckl. stato 93-05-23)

___ 8. La milito de la majuskloj (ckl. stato 93-05-23)

Publikigaĵoj de Terminoteko haveblaj nur de Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado KOL 1BO (poŝtĝir-konto Hannover [D] 1173 68-306) [ŝanĝoj rezervitaj]:

___ Plena Pekoteko 1985-1990 (1816 p., 80 US\$ + 10,- US\$ por sendkostoj)

___ Esperanta Bildvortaro

=====

(US\$ 40 aŭ DM 60 anstataŭ
US\$ 48 aŭ DM 72)
___ Esperanto en la
Moderna Mondo (US\$ 10 aŭ
DM 15 anstataŭ US\$ 25);

ambaŭ rabatitaj nur, se menditaj
samtempe kun PP.

*Enhave senŝanĝa represo
de la eldono Aprilo 1993.
Multaj kontakt-adresoj ne
plu aktualas. Pro la alia
skribo la paĝo-indikoj en la
enhav-tabelo ne plu ĝustas.*

*Kontaktu nun
Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigu [ĉe] per @)*

*© Bernhard Pabst,
Aŭgusto 2006*